TEA-BULTENO

4ª JARO **APRILO 2001** **NUMERO 4**

AGENDO

1	**D**	
2	L	
3	M	Ordigo de TEA-arkivo
4	M	
5	Ĵ	
6	V	Prikongresaj laboroj
7	S	
8	**D**	
9	L	
10	M	Ordigo de TEA-arkivo
11	M	
12	Ĵ	
13	V	Prikongresaj laboroj
14	S	
15	**D**	Bonan Paskon!
16	**L**	
17	M	Ordigo de TEA-arkivo
18	M	
19	Ĵ	
20	V	Pri kongresaj laboroj
21	S	Malferma Tago ĉe UEA
22	**D**	
23	L	
24	M	Ordigo de TEA-arkivo
25	**M**	
26	Ĵ	
27	V	Kartludado: Rumio
28	S	
29	**D**	
30	L	

Ne eraras nur kiu nenion faras!

70ª Itala Kongreso de Esperanto

Trieste 28 julio - 1 aŭgusto 2001

Eŭropo 2001: Kulturoj - Lingvoj - Esperanto

Estas tiu ĉi la jaro, kiun Eŭropa Unio kaj Eŭropa Konsilio dediĉis al lingvoj, al ilia instruado kaj al ilia disvastigo. Per tiu ĉi agado oni intencas atentigi eŭropajn civitanojn pri la fakto, ke kultura kaj lingva diverseco estas promocia faktoro kaj neniam baro al paca kunvivado.

Estas tiu ĉi la jaro, kiun esperantistoj dediĉis al kultura plureco, al lingva diverseco kaj al la tiurilataj problemoj, konstante aperintaj, precipe en la internaciaj rilatoj, sed ankaŭ en la ĉiutaga vivo.

Tiu ĉi 21ª jarcento ŝajnas esti la tutmondiĝa jarcento: ĉiutage ni vidas ĝiajn spurojn - ekonomio kaj komerco ne plu havas limojn, sed nur merkatojn kaj laboristojn. Kaj la laboristoj hodiaŭ aktivas en Italio, Germanio, Rusio, morgaŭ en Usono, postmorgaŭ eble en Ĉinio aŭ Sud-Ameriko.

La lingva diverseco en Eŭropo, en la mondo, povas ŝajni malbeno al tiuj kiuj partoprenas seminariojn kun la angla kiel laborlingvo kaj bedaŭras ne esti denaske anglaparolantoj. Ĉu ne estus bele, kaj eĉ profite, se ĉiuj parolus saman lingvon?

La lingvoj de Eŭropo, de la mondo, estas grandioza riĉaĵo. En ili dormetas kulturo kaj historio de la homaro kaj ĉiuj kune konsistigas heredaĵon kies gardado devas havi prioritaton. Sed la homaro...

... kiamaniere frontas tiujn ĉi problemojn ligitajn al lingva plureco kaj al la oportuneco havi komunan lingvon por internaciaj rilatoj?

Kiuj kostoj kaŝiĝas en plurlingveco?

Kiel gardi la diversajn etnajn identecojn, la ecojn de la popoloj? Kiel konservi la kutimojn kaj tradiciojn proprajn de ni ĉiuj?

Ankaŭ pri ĉio ĉi ni diskutos kaj interŝanĝos opiniojn dum la kongresaj laboroj. Aktualega temo, ĉu ne? Nu, ankaŭ VI estas invitata alporti vian kontribuon.

Programon, aliĝilon, hotelmendilon kaj aliajn informojn oni povas trovi en nia paĝaro ĉe:
http://www.esperanto.it/fei/congresso/index.html

Grava informo por Esperanto-filatelistoj

En la inaŭgura tago, dimanĉon la 29ª de julio, funkcios de la 10ª ĝis la 18ª h. poŝtoficeja giĉeto en la kongresejo. Tiam oni ricevos specialan stampon sur bildkartoj kun la simbolo de la kongreso.

Vere "speciala" stampo, ĉar, unuafoje en Italio, la teksto estos ankaŭ en Esperanto.